



N-ro 3 - 2006.08.01

# Florenca Lilio

KURIERO DE LA 91A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

*Tuta mateno de programeroj edukis, paroligis kaj pensigis vin la UK'anojn. La tradicia Kleriga Lundo ĉi-jare proponis pli da seminarioj, kun alta partopreno.*

## KLERIGA LUNDO TRA ESPERANTUJO

Kio ankoraŭ ne dirita oni povus diri pri la Kleriga Lundo? Ĉi-jare ni organizantoj alfrontis novan defion. Anstataŭ 12, temis pri 15 seminarioj, laŭ plej diversaj temoj: movadaj, kulturaj, sociaj, klerigaj, amuzaj. La salonoj plenis, la homoj estis kontentaj. Lingvistoj diskutis kiel interesigi samfakulojn, ni povis ekkoni per la vortoj kaj bildoj de niaj mondvojaĝantoj la plej multajn esperantistojn, kiuj ne povas veni al la kongresoj; per kortuŝaj vortoj kaj deklamoj estis prezentitaj la italaj E-poetoj, de Mazzolini al Aldo de' Giorgi.

Kaj por resti ĉe la ĉi-tiea lando, amuza kunsido temis pri la virtoj kaj malvirtoj de italoj, tra la okuloj de eksterlandanoj loĝantaj ĉi tie. Sed kompreneble pluraj seminarioj temis pri Renesanco laŭ plej diversaj aspektoj. Kaj laste, kiel kutime sukcesa, estis la sesio pri la arto oratori, estrata de Tonkin kaj Wera Banke.

Ĉu ontjare estos pli bona? Tio estas interesa defio.

Kongresanoj donu siajn opiniojn kaj sugestojn dum ĉi kongreso, per mesaĝo al KN 99, aŭ poste, rete al [michela.lipari@tiscali.it](mailto:michela.lipari@tiscali.it)

**Unua bloko: 9.00 – 10.30**

**Tra Esperantujo.** Chavignon, Kapista, Binaghi.

**La Latina Lingvo : Imperio, Eklezio, Kulturo.** Prytz, Barandovska, Berveling

**Italaj Poetoj en Esperanto.** Rossi, C. Minnaja, Lipari.

**Informado: Kiel Utiligi Amaskomunikilojn?** Miyoshi, Poláková, T. Bormann.

**Sociaj Agadoj.** Vessella, Schwarzer, Turcato.

**Dua bloko : 10.45 – 12.15**

**Vidi per Manoj – Kiel Blinduloj Ĝuas Arton.** Grassini, Da Costa, Prytz.

**Renesanco en Italio.** C. Minnaja, Berveling, Clerici

**La Arto Paroli Publike.** Blanke, Tonkin.

**Verda Mondo.** Auderskaya, Rao, Kühnel.

**Scienco kaj Popolo.** N. Minnaja, Bishop, Tarracchini.

**Tria bloko : 12.30 – 14.00**

**Veterani Sed Ne Maljuni.** W. Bormann, U. kaj G. Grattapaglia.

**La Itala Renesanco Renkonte al la Mondo.** Tonkin, Moerbeek, Wen.

**Italaj Eksterlande, Eksterlandanoj en Italio.** Zappelli, Winberg, Altherr.

**Orienta Mediteraneo.** Pennacchiotti, Pontika.

**Kiel Organizi Niajn Interlingvistojn?** D. Blanke, La Torre, Cizikaite.

**Tria bloko de Kleriga Lundo: Veterani sed ne maljuni**

Kvindeko da pli-malpli veteranoj ĉeestis la kunvenon por ĉefe debati la temon: "Kion la esperanto socio povas gajni per la efikaj kontribuoj de siaj pli maljunaj partoprenantoj". El la multaj kontribuoj, aperis rekomendo al UEA por ke ĝi starigu konsilantaron de eksaj estraranoj, kiu povus doni "sugestojn" (saĝajn) al la nova estraro, bazitaj sur siaj spertoj pri la movado. Sama sugesto taŭgas ankaŭ por la Landaj Asocioj, kiuj ofte baraktas kontraŭ malfacilaĵoj por trovi novajn vojojn por la disvastigo de niaj ideoj. Tamen tio en harmonio kun la novaj junularaj tendencoj profiti pri la eblecoj de la novaj teknologioj. *KN 130*

**Dua ŝanco aŭdi la teatraĵon *Stilekzercoj*** - Du pasaĝeroj en aŭtobuso. Anekdotoj rakontata en deko de la plej diversaj stiloj. Tiu peco, amuza kaj interesa, estos prezentata de la franca aŭtoro Henri De Sabatts dum la Teatra Vespero, **mardon** je la 19 h. en salono Minnaja. Por tiuj kongresanoj kiuj ne sukcesos vidi ĝin en tiu vespero, aŭ kiu serĉas distran agadon post Ekskursita Tago, ekzistas dua ebleco spekti ĝin kadre de la Junulara Programo ĉe la gastejo *Villa Camerata* je 21 h. merkredon la 2-an de Aŭgusto.

**INTERESAKAJ ALLOGAKVIZOLUDO** kun multaj premioj okazas **mardon la unuan de aŭgusto** en la salono *Canuto* je la 17 h. Kvizoludon gvidas s-ro Marian Zdankowski (Pollando) kun helpantoj. La premioj atendas vin kaj donos ilin Margareta Handzlik, la eldonejo *Sezonoj* el Kaliningrado, la eldonejo *Hejme* el Pollando kaj *Studumo* el Bydgoszcz.

Estu certe: vi ne enuos dum kvizoludo!

**En la Ekskursita Tago, Merkrede, la Kongresa Kuriero ne aperos**

La poŝtoŝefo por havigi al si la filatelian stampon de la UK laboros la unuan de aŭgusto (lasta deĵor-tago) de la 10h00 ĝis la 16h00.

## Okazis...

**Tri subkomitatoj jam kunsidis** - Post la inaŭguro de la kongreso, en la dimanĉo kunsidis tri el la ok subkomitatoj. La subkomitato pri financoj diskutis pri buĝeto, pri fondajtoj kaj membrotizoj, kaj faros proponojn pri tio al la komitata kunsido vendrede. Estis ankaŭ diskuto pri materialo por membrovarbado kaj pri manieroj pagi kotizojn. Junularo estis la temo de alia subkomitato, kun diskuto pri partopreno de junuloj en la kongreso, pri malmultekosta loĝado, pri kongresa programo por junuloj. Alia diskuto temis pri eduko de junaj instruistoj. Tria subkomitata kunsido temis pri eksteraj rilatoj, kun diskuto pri kontaktoj kun UN kaj Unesko, kaj pri bezono de gvidlibro pri tiaj kontaktoj je landa nivelo. En la vendredo la komitato ricevos la raportojn de ĉiuj subkomitatoj, por eventualaj decidoj. *Ulla Luin (KN 81)*

Dum la kunsido de **Internacia Naturkuraca Asocio (INA)** okazis du prelegoj. La unua, kiun prezentis la prezidanto de la kunsido, naturkuracisto Harald Schicke (KN 803), Germanio, temis pri "Kuracado laŭ pastro Kneipp" kaj prezentis la kvin kolonojn de naturkuracado: akvo, herbokuracado, movado, nutrado kaj vivordigo. La duan prezentis Prof. Alicja Lewanderska, Pollando, pri la temo "Eblo de feliĉo, sukceso kaj riĉeco". *Informis Harald Schicke (KN 803)*

La **subkomisiono pri kulturo** kunsidis lunde kun diskuto pri tiaj kulturaj aranĝoj kiel ekspozicio de bildo-artoj en la kongresoj, kaj la variaj kondiĉoj por aranĝi tion. Aliaj partoj de la diskuto temis pri la ekonomiaj kaj ĝeneralaj kondiĉoj por retaj elsendoj de televido kaj son-raportoj.

Posta **subkomitata kunsido temis pri informado**. Tiu kunsido traktis ĉefe la unuan el la tagordaj punktoj, ĉar la diskuto temis pri variaj eblecoj aranĝi ago-tagojn, semajnojn de internacia amikeco, lingvotagojn kaj simile. Frua planado kaj ideo pri la celo de la aranĝo pli gravas ol aranĝi ion en multaj landoj samtempe.

Trie kunsidis la **subkomitato pri fakaj kaj scienca agado**. La fakaj asocioj ricevas eblecojn kunveni aŭ informi pri si mem en la kongreso, sed la bezono kaj deziro estas multe pli grandaj, kvankam samtempe la eblecoj eble ne estas sufiĉe konataj.

Pri ĉiuj subkomitataj kunsidoj estos raportoj al la komitato vendrede.

*Raportis: Ulla Luin, KN 81*

## NEKREDEBLA SERIO

da teknikaj paneoj malebligis ke la hieraŭa LILIO aperu ĝustatempe. Dum 3 horoj oni klopodis funkciigi la presilon, kiu ne plu akceptis kunligon kun la komputiloj. Ankaŭ dua presilo ne plu volis labori. Je la fino oni sukcesis trovi elturniĝon (dankegon, Marija!). La grafika rezulto korespondis al la provizora solvo (ekzemple la fotoj estis tro malhelaj), pro kiu ni pardonetas. Eblas tamen vidi belaspektan, koloran LILION je la TTT-paĝoj [www.uk2006.info](http://www.uk2006.info)

## Saluto de d-ro Zaleski-Zamenhof dum la UK-inaŭguro

Sinjoro Prezidanto, gesinjoroj Honoraj Gastoj, estimataj Gekongresanoj, karaj Amikoj, akceptu mian tradician tutkoran saluton, saluton de Zamenhofa familiano al la granda Zamenhofa familio ĉi tie alveninta de ĉiuj partoj de nia terglobo. Por mi la momento estas aparte kortuŝa, ĉar en tiu ĉi bela urbo de Florenco mi jam aliafoje ĉeestis Esperanto-kongreson: la 27-an UK tie ĉi komenciĝintan. Mi intence ne elvokas la daton tiurilatan, dezirante evitigi kalkulon de mia aĝo; mi estis tiam juna knabeto kaj juna estis nia movado. De post tiam mi iom maljuniĝis, tamen la movado daŭre estas juna, daŭre fervora kaj daŭre evoluema; ĝuste pri la daŭrigebla evoluado ni havos la okazon diskuti dum ĉi tiu, la 91-a kongreso.

Fakte hodiaŭ mi salutas vin ne nur en la rolo de Zamenhofa nepo sed samtempe en la rolo de Prezidanto de la Honora Komitato de la Zamenhofa Fondumo, starigita antaŭ ĉirkaŭ 20 jaroj en la naskiĝurbo de mia Avo, Fondumo dediĉita al disvastigo tra la mondo de Zamenhofaj ideoj. Unu el ĉefaj tiuj ideoj, ideo kiu iniciatis la naskiĝon de nia lingvo internacia, estas ideo de toleremo, ideo de akcepto kaj de kompreno de la alia, de la malsama. Toleremo de la diverseco de kulturoj, tiu diverseco estante la granda riĉeco de homaro. Sekve la Fondumo kreis Medalon de Toleremo por honorigi personojn aŭ instituciojn grave kontribuantajn al efektiviĝo de tiu ideo. Post la dekorado i.a., antaŭ kelkaj jaroj, de la forpasinta Papo Johano Paŭlo, heroldo de ekumenismo, do de toleremo interreligia, ni honorigos per la sama medalo, tuj post la Kongreso, la Mondan Skoltaron, organizaĵon laŭdegantan, de post Baden-Powell, ĝia kreinto, la toleremon de etna diverseco kaj edukantan tiusence la tutmondan junularon. Estos Profesoro Corsetti, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio kiu, asistota de Guido Ricci, Prezidanto de Skolta Esperanto-Ligo, akceptis la ŝarĝon enmanigi la medalon al la ĉefaj instancoj de la WOSM, la Tutmonda Skolta Movado, en la persono de Doktoro Missoni, la Ĝenerala Sekretario, tion farante antaŭ kvin miloj da skoltoj kunflugontaj al Toskanio el la tuta Eŭropo. Mi menciuj por la bonordo, ke estis Renée Triolle, kiu, ene de Unesko, havis por UEA unuajn kontaktojn kun la WOSM, implicintajn elekton de la skoltoj kiel kandidaton por la medalo.

Mi deziras al la Kongreso plenan sukceson kaj vastan eĥon en la mondo; ĝi estu granda paŝo antaŭen al la disvastigo de la lingvo internacia, al la kompreno de la graveco de ĝia edukado por la daŭrigebla evoluo.

Louis C. ZALESKI-ZAMENHOF

## GRAVA ĜUSTIGO

En FLORENCA LILIO n-ro 1, paĝo 2, en artikolo "50 jaroj da juneco..." oni erare skribis ke Helen Fantom estas edzino de Kristoforo Fettes. Tio ne estas vere: ni pardonpetas al s-ro Fettes kaj al s-rino Helen Fantom.

## Ĝisdate pri la programo:



### TAGO DE LA LERNEJO - MARDON, 2006-08-01, 10h15-15h45, salono MINNAJA

10h15-10h20	Enkonduko, Radojica Petrovic
<b>10h20-11h00</b>	<b>Edukado kaj instruado de Esperanto en Italio</b>
10h20-10h35	Edukado en Italio, <i>Aldo Grassini</i>
10h35-10h50	Lingvolernado kaj instruado de Esperanto en Italio, <i>Anna Maria Colacicchi</i>
10h50-11h00	Demandoj kaj diskuto
11h00-11h05	Paŭzo
<b>11h05-12h45</b>	<b>Esperanto en lernejoj de Eŭropo</b>
11h05-11h20	La projekto Springboard for Languages en Britio, <i>Angela Tellier</i>
11h20-11h35	Laborgrupo "Lingvolanĉilo", <i>Dr. Lajos Molnár</i>
11h35-11h45	Demandoj kaj diskuto
11h45-12h00	Geknaba aranĝo FRINGOJ, <i>Elizabet Barbay</i>
12h00-12h15	Interlerneja projekto AKEL-2, <i>Ermanno Tarracchini kaj Luigia Oberrauch Madella</i>
12h15-12h25	Demandoj kaj diskuto
12h25-12h40	Esperanto en la servo de gelearnantoj, <i>Marija Belolevic kaj Svijetlana Akik</i>
12h40-12h45	Demandoj kaj diskuto
12h45-13h00	Paŭzo
<b>13h00-14h00</b>	<b>Esperanto en universitatoj</b>
13h00-13h15	Lerni Esperanton kaj studi per Esperanto universitatnivele, <i>Amri Wandel</i>
13h15-13h20	Demandoj kaj diskuto
13h20-13h35	Esperanto en ĉinaj universitatoj, <i>Yu Tao</i>
13h35-13h50	Spertoj kaj observoj de universitata E-instruisto, <i>Aida Cizikaite</i>
13h50-14h00	Demandoj kaj diskuto
14h00-14h05	Paŭzo
<b>14h05-15h35</b>	<b>Instruado de Esperanto tutmonde</b>
14h05-14h35	Instruado de Esperanto en Afriko: atingoj, planoj, diskuto; <i>Molière Ngangu, François Hounsounou, Maritza Gutierrez, Sabine Hauge</i>
14h35-14h50	ISLA-2006: Internacia E-lernejo en Armenujo, <i>Radojica Petrovic</i>
14h50-14h55	Demandoj kaj diskuto
14h55-15h10	NESTO: malĉeesta kaj perkomputila lernado de Esperanto, <i>Adonis Saliba</i>
15h10-15h15	Demandoj kaj diskuto
15h15-15h30	Retpoŝta Esperanto-kurso por ruslingvanoj, <i>Anna kaj Mati Pentus</i>
15h30-15h35	Demandoj kaj diskuto
15h35-15h45	Konkluda diskuto kaj pritakso

### NOVAJ PRELEGOJ

**Ĵaŭdon, la 3an de aŭgusto, Salono Minnaja, 9h00-9h45:**

Hinda kontribuo al la mondo de scienco kaj matematiko.

**Ĵaŭdon la 3an de aŭgusto, Salono Grazzini, 11h00-11h45: IKEL (2a kunsido)**

**Internacia Koruso** - Pro la nealveno de la kutima gvidanto la koncerto de la Internacia Koruso ne okazos. Tamen, la Koruso funkcias, ekzercas je la indikitaj horoj kaj aparte kontribuos al la programo de la Internacia Vespero. Novaj, kapablaj kantemuloj estas invitataj senformale aliĝi al la Koruso por prepari kaj prezenti la kantaĵojn. *Franz-Georg Rössler (KN 801)*

### Invitoj

**BUDHISMA MEDITADO** okazos ĉiumatene dum la UK je 08:15 en Hotel Baglioni, Piazza Unità Italiana 6, Suite Carrega (unua etaĝo). Ĉiuj bonvenaj! Informis: Budhana Ligo Esperantista, Gunnar Gällmo" <gunnargallmo@yahoo.se

**KAT-ŜATANTOJ!** Se vi ŝatas katojn, ne maltrafu **mardon la unuan de aŭgusto**, la kunsidon de Rondo "Kato" / Esperantista Kat-amikaro, je la 14h30 en salono Grazzini

**Ĝuu klerigan restadon en Grezijono!** - La franca kulturdomo de Esperanto organizas, ĉiun someron, diversnivelaĵn kursojn, seminariojn kaj aktivajojn (jogo, koruskantado, librobindado, masaĝoj, go-ludo, astronomio, ktp.). Oni loĝas en kastelo aŭ tendumejo. Vi ĝuos grandan parkon (18 ha), padon, flugpilkon, tablotenison, sed vi ankaŭ povas nur ripozi! Grezijono situas en la regiono de la famaj kasteloj kaj vinoj. Vizitu nian retejon [www.gresillon.org](http://www.gresillon.org). Ni atendas vin por ĝui bonan etoson en tiu 54-jaraĝa esperantio. *KN 838 kaj 1100*

**Vizitoj al Britio** - Bultenoj de la Londona Esperanto-Klubo kaj la Brita Kongreso Letchworth (Majo 4-7 2007) haveblas de San Fantom (KN 2117).

**Pri la estonteco de AIS** - Merkredon vespere, de la 19a ĝis la 21a horo, amtaŭdiskutos la deĵorantaj kaj la vicaj senatanoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino en la ĉeesto de aliaj interesitaj efektivaj, adjunktaj aŭ liberaj AISanoj la planendan estontecon de AIS dum la jaroj 2008-2011. Temos pri la deĵortempo de la nova AIS-senato elektota en San Marino la 3an de septembro 2007. La tiam elektitaj senatanoj tie samtage elektos inter si la novan prezidanton kaj decidos pri la kadra laborprogramo 2008-2011. Ĉiuj kongresanoj, kiuj serioze interesiĝas pri la laboro de la Akademio, ankaŭ se ili ankoraŭ ne aliĝis al la Internaciaj Scienca, Sciencaplika aŭ Arta Kolegioj de AIS, estas invitataj partopreni en la neformala interkonsiliĝo. Ĝi okazos en la Grand-Hotel Baglioni, kiu situas 10 piedminutoj for de la kongresejo (en la direkto de la stacidomo), Piazza Unità Italiana 6 (apud la obelisko), en la unua etaĝo, salono Carrega. *KN 140 (Frank)*

**Vizito en Rotaria Klubo** - Mardon la unuan de aŭgusto esperantistaj rotarianoj vizitos rotarian Klubon en Florenco. Renkontiĝo je la 19h00 antaŭ "Palazzo Vecchio" (urbodomo). Informis KN 130

2116		S-rino Helen Fantom, Britio
2217		S-ro Ian Fantom, Britio
2118		S-ro Arturo Orlando, Via San Giovanni 60, Eboli, Italio
2219		S-ro Jesuo De Las Heras, Ap.4461, 30080 Murcia, Hispanio
2120		S-ino Sonia Chatelan, CH.Du Val-D'angrogne No.8 -1012, Lausann, Svislando
2121	jcca-f	S-ino Marguerite Jaccard, Residence Carina Sous-Le-Rosey, CH-1180, Rolle, Svislando
2122	coal-o	S-ro Alessandro Corrado, Via Fontane 54, 25133 Brescia, Italio
2123		S-ro Mark Rainey, 995 E.Baseline Rd. Apt.1021, Tempa, AZ 85283 Usono
2124		S-ino Ilda Dashi, R.R.Alexander Moisin p.27 Sh.3 Ap.24, Tirana, Albanio
2125		S-ino Marisa Pertempi, Via N.Bixio, 116 Falconara, Ancona, Italio
2126		S-ino Veronica Colabene, Castelfidardo, Ancona, Italio
2127		S-ino Riviane Rodrigues, Shin Al.13 Cj5 Casa 19, Brasilia, Brazilo
2128		S-ino Eana Marin, Str. Miozitei BL.A8 App. 7,5100 Buzan, Romania
2129		S-ino Katalin Kosztolanyi, Florilor Str.15, 535600, Odorheiu Secuise, Romanio
2130		S-ino Profira Ciobanu, Str. Miozitei BL.A8 App. 7,5100 Buzan, Romania
2131		S-ino Eparaskeva Bojiagieva, ul. Skobelev, 4002 Plovdiv, Bulgario
2132		S-ino Veronica Colabene, Blindula akompananto
2133		S-ino Anisa Proda, R.R. Riza Cerova 86/1, Tirana, Albanio
2134		S-ino Laura Stefanini, Via Di Vittorio 9, 60019 Senigallia, Ancona Italio
2135		S-ino Valentina Carletti, Via P.Castaldi, 9, 00153, Roma - Italio
2136	ragr-j	S-ro Rochelle F. Grosman, 80-50 Baxter Av. 30, Elmhurst, NY 11373 Usono
2137		S-ino Beatrice Devais, 10 Rue Despagne, 44000 Nantes, Francio
2138		S-ino Madalen Billieux, 12 rue de la Combriou, 49120 Chemille Francio
2139	snbe-g	S-ro Snorre Benum, Betzy Kjelsbergsvei 3A, 0486 Oslo - Norvegio
2140	sera-z	S-ino Natalie Sera, 135 Stoker Ave., Reno, NV 89503 Usono
2141		S-ro Washington Pinheiro Silva, Quadra 10 Casa 50A, Brazlandia Setor Norte Brazilo
2142		S-ro Zack Noah, 1103 Arnoldsville Rd, Winterville, Ga Usono
2143		S-ro Jacque Cotton, 1 rue Alfred Bertholov 01000, Bougen B. Francio
2144		S-ro Nicolas Castillon, 7 Avenue Rossina 83, 790 Pignans Francio
2145		S-ino Christian Castillon, 7 Avenue Rossina 83, 790 Pignans Francio
2146		S-ino Elizabeth Stanley, Frome House, Frome Gardens, Strond, Glos, GIS4LE Britio
2147		S-ino Rosa Stanley, Frome House, Frome Gardens, Strond, Glos, GIS4LE Britio
2148		S-ino Nelly Martinez Mateos, Meksiko
2149		S-ro Christer Lornemark, Basungatan 22 SE-656 36, Ralstad, Svedio
2150	jeha-f	S-ro Georgo Handzlik, Bielsko-Biata, Braterska 41 Pollando

## MARDON, LA 1an DE AŬGUSTO, 14h30/16h30 en Salono Canuto

### La lingvaj profesiuloj atestas...

“Terminologiaj demandoj aperas ĉiupaŝe en nia redakcia laboro” deklaras Barbara Pietrzak, estro de la E-a redakcio de Pola Radio. “Jen alvenas depeŝo parolanta pri nova uzino, aŭ pri sensacia malkovro de polaj arĥeologoj, kaj ni devas traduki ĝin al Esperanto, trovante ĝustajn ekvivalentojn por ĉiu pola fakvorto. Kompreneble ekzistas vortaroj, sed ili ne ĉiam sufiĉas aŭ komplete kongruas kun la bezono.” La redakcio pretigas ankaŭ pollingvajn tradukojn de la plej interesaj leteroj de siaj aŭskultantoj por la eksteraj instancoj. Ĉeokaze aperas tiklaj demandoj i.a. se la korespondanto ne konas ĝustan fakvorton kaj uzas perpleksigan memelpensaĵon.

Tiajn problemojn frontas pli-malpli same ĉiu profesia E-isto, eĉ se li laboras en kampo tute ekstera al la t.n. sciencoj kaj teĥnikoj. “Tro ofte oni rilatigas terminologion nur kun sciencaj fakoj” konstatas Wera kaj Detlev Blanke, konataj fakuloj pri terminologio, “sed ĉiu fako bezonas fakvortan provizon, ankaŭ poetiko aŭ kuirarto ĝin bezonas. Pro la kreskanta signifo de fakaj aferoj en la ĉiutaga vivo ne malmultaj el tiuj fakvortoj neeviteble aperas en nefakaj tekstoj, skribaj aŭ parolaj”.

Konfirmas tion la spertoj de István Ertl, kiu prilaboras tekstojn publikigatajn de Eŭropa Unio kiel oficialajn, alia nescienca kampo, en kiu proksimumaj tradukoj ne estas bonvenaj! “La Eŭropa Revizora kortumo produktas ĉiujare dikajn raportojn, kaj dekojn da diversaj opinioj kaj specialaj raportoj, por kiuj necesas traduko al ĉiu Unia lingvo. Mi okupiĝas ĉefe pri la hungaraj tradukoj, kaj imagi, ke ĉiu agad-tereno de la Unio, al kiu etendiĝas la revizora laboro de nia Kortumo, havas sian terminaron, de bovobredado tra instru-helpiloj ĝis esplorado de drogoj. Cetere, la hungara, kiel relative nova Unia lingvo, estas interesa ekzemplo por ni E-istoj, ĉar ni ofte alvokas al oficialigo de Esperanto. Kion do fari por pretigi la lingvon al tia eventualaĵo?”

Surbaze de siaj spertoj debatos kun la publiko en la hodiaŭa Terminologia Forumo Barbara Pietrzak kaj István Ertl, kune kun Detlev Blanke, kiu alportos sian teorion prilumon, kaj Marc Bavant, direktoro de la Sekcio pri faka lingvo de AdE, kiu gvidos la aranĝon.

**Marc Bavant**

### Por kontakti la redakcion:

- Vi povas VENI al la Gazetara Servo, en Salono Fighiera-Sikorska, teretaĝe, en la kongresejo;
- aŭ Vi povas SENDI retpoŝtan mesaĝon al adreso: <kontakto-lilion@yahoo.com>
- aŭ Vi povas TELEFONI al itala poŝ-telefono: (+39) 338 860 20 84. Al ĝi Vi povas sendi ankaŭ SMS'n.

**Por la realigo de ĉi tiu 3a Lilio, kunlaboris  
Carlo Sarandrea, Gianluca Campanella kaj Maria Beloŝević**